

# Pola

Nro 7

# Esperantisto

XXXI  
JARO

JULIO  
1937

Esperantysta  
Polski

---

ELDONANTO WYDAWCA POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARO  
REDAKTANTOJ PROF. DR ODO BUJWID — MGR TAD. HODAKOWSKI  
REDAKTORZY

---

APERAS LA 1-an DE CIU MONATO. REDAKCIANMATERIALON ONI PETAS SENDI GIS LA 20-a DE  
CIU MONATO. LA REDAKCIO ESTAS RAJTIGITA LAŬ BEZONO SANGI LA TEKSTON DE MANUSKRIPTOJ.

---

## BONVENON AL LA KONGRESANARO!

Kaj ree post 6 jaroj Pollando havas la honoron inviti la tutmondan samideanaron al la jubilea kongreso de Esperanto okaze de 50-jara ekzisto de Esperanto, tiu genia kreaĵo de varŝava kuracisto, dro Ludoviko Zamenhof.

50 jaroj... Longa tempo, kutima vidaŭro de homoj... Kiom da venkoj kaj kiom da malsukcesoj!... La mondo estas tamen plena de antaŭjuĝoj kaj miopa... Valorega invento, certe ne malpli valora, ol ekz. radio, Esperanto ne povis ĝis nun profunde enradikiĝi, ĉie disvastiĝi, definitive venki. Ĉu niaj metodoj de propagando ne estis taŭgaj? Ĉu eble naskiĝo de Esperanto trafis tiel malkonvenan periodon en historio de la homaro, kiu absolute malfavoris ĝian rapidan ĝeneralan enradikiĝon?

Ekzistas en historio de Esperanto en diversaj landoj, simile kiel en historio de aliaj movadoj, „corsi” kaj „ricorsi” — laŭ esprimo de itala filozofo — fluoj kaj refluoj, dum kiuj Esperanto antaŭenmarŝas aŭ reiras. Certe la nunaj tempoj ne favoras nian ideon, ĉar la periodo de ĉiam pli febra sinarmado de

popoloj, la tempo de „armilpretiga paco” blindigas la naciojn, ne permesas vidi profitojn, kiujn donus la venko de Esperanto, kies interna ideo portas universalan pacon, surteran paradizon, idilion de la homaro. Ankaŭ en frata ideo de Ligo de Nacioj ni vidas krizon... Ĉu ĝi bankrotis? Ni firme kredas, ke ne! Finfine malbono ne povas venki bonon... Absolute ne!

Interkomprenon kaj amon ni havas kiel devizon. Ĝi estas destinita eĉ por eksporto, por ne-samideanoj, sed bedaŭrinde tro malmulte da ĝi ni havas por niaj propraj bezonoj. Disrompiĝo en nia movado... Fatala miskonkordo, kiu disigas niajn fortojn...

La plej ĉefa tasko de la kongreso estu enuecigo de niaj organizaĵoj, — tiun taskon ni devas inter ni plenumi, — kaj la alia esta destinita por eksterno: pripensi la agadmanierojn por enkonduki Esperanton en la lernejoj kaj tiun planon obstine realigi.

Samideanoj, vi, kiuj partoprenos la kongreson, konsideru, ke de plenumo de tiuj du taskoj dependas la plua disvas-

ligado de Esperanto, plirapidigo de ĝia definitiva venko, ke la jubilea kongreso devas esti epokfara okazintaĵo en historio de nia movado, turnpunkto en niaj laboroj.

Memorigante la signifon de la kongreso, ni plej kore invitas vin ĉiujn samideanojn al la plej multnombra partopre-

no en ĝi por decidi pri la gravegaj problemoj, ĝui la kongresan kaj postkongresan restadon en naskolando de la Majstro kaj viziti ĝiajn vidindaĵojn. Varmkore ni atendas vin! Venu grandare!

Prof. Dro Odo Bujwid.

## 29 UNIVERSALA JUBILEA KONGRESO DE ESPERANTO

VARSOVIO 7—15 DE AŬGUSTO 1937.

En la tagoj de 7-14 de aŭgusto 1937 okazos en Varsovio la XXIX. Universala Jubilea Kongreso de Esperanto laŭ la jena programo:

|                       |   |       |  |
|-----------------------|---|-------|--|
| 7. 8. 1937 sabato.    | 15.00   | horo. | Kunsido de Internacia Pokongresa Komitato kaj LKK.   |
|                       | 19.00   | „     | Interkonatiĝa Vespero (en ĝardeno). Muziko, dancoj.  |
| 8. 8. 1937 dimanĉo.   | 9.00  | „     | Diservoj.  |
|                       | 12.00   | „     | Solena Malfermo de la Kongreso (Jubilea parolado de prof. Odo Bujwid).                             |
|                       | 17.00   | „     | Malfermo de la XIV Kongreso de Blindaj Esperantistoj.  |
|                       | 19.00   | „     | Malfermo de la Jubilea Ekspozicio.   |
|                       | 20.30   | „     | Festo de Veteranoj.  |
| 9. 8. 1937 lundo.     | 10.00   | „     | Ĉe la tomboj de l'Majstro kaj Grabowski.   |
|                       | 16.00   | „     | Laborkunsidoj de IEL kaj UEA.  |
|                       | 20.00   | „     | Teatro: 1) „Consilium Facultatis“, unuakta komediaĵo de grafo Aleksandro Fredro (trad. Grabowski). |
|                       |   |       | 2) Pola muziko — danco — kanto.  |
| 10. 8. 1937 mardo.    | 9.30  | „     | TEKA, TAGE (unua kunsido).   |
|                       | 12.00   | „     | Katolikoj; Bahaa-anoj.   |
|                       | 16.00   | „     | Laborkunsidoj.   |
|                       | 20.00   | „     | Literatura Vespero.  |
| 11. 8. 1937 merkredo. | P i l g r i m o a l B i a ł y s t o k.                    |       |  |
| 12. 8. 1937 ĵaŭdo.    | 9.30  | horo. | Lingva Komitato.   |
|                       | 10.00   | „     | Unuiĝo de Esperantaj Virinoj.  |
|                       | 12.00   | „     | Kristana Esperanto-Ligo; Profesiaj Ĵurnalistoj.  |
|                       | 16.00   | „     | Internacia Scienca Asocio Esperantista; Kooperativistoj.   |
|                       | 20.00   | „     | Kabaredo.  |
| 13. 8. 1937 vendredo. | 10.00   | „     | TEKA: (popularaj prelegoj).  |
|                       | 12.00   | „     | TAGE (dua kunsido).  |
|                       | 16.00   | „     | Laborkunsidoj.   |
|                       | 21.00   | „     | Internacia Balo.   |
| 14. 8. 1937 sabato    | 10.00   | „     | Ferma Kunsido.   |
|                       | 20.00   | „     | Adiaŭa Vespero en Varsovio.  |
| 15. 8. 1937 dimanĉo.  | L i b e r v o l a t a g o e n V a r s o v i o. Ekskursoj. |       |  |

Rimarkoj: La Organizantoj de aliaj Fakaj Kunsidoj, ne menciitaj en la supra programo, bonvolu tuj anonci vin, por ke ni povu prepari lokon kaj rezervi tempon en la programo.

Ĉiutage akazos grupaj vizitadoj de la urbo, ŝipaj promenadoj sur Vistulo, ekskursoj al la belega reĝa rezidejo „Wilanów“ ktp.

En la kongresejo funkcios kino, kiu prezentos esperantajn filmojn.

### RABATO SUR POLAJ FERVOJOJ.

Ĉiuj kongresanoj ricevas 33%-an rabaton sur polaj fervojoj laŭ la kongreskarto kaj speciala fervoja legitimilo, ricevotaj de LKK. Grupoj minimume 60- personaj ricevas 50%-an rabaton sur polaj fervojoj.

Por ricevi grupajn rabatojn estas necese anonci al LKK nomojn de la grupgvidanto kaj de la tuta grupo, krome — la vojaĝlinion.

### HOTELOJ.

Ni rezervis por la kongresanoj hotelojn en 5 kategorioj laŭ la jenaj prezoj:

| <u>Luksaj hoteloj.</u> | <u>Kategorio I.</u> | <u>Kategorio II.</u> | <u>Kategorio III.</u> | <u>Komunaj loĝejoj.</u> |
|------------------------|---------------------|----------------------|-----------------------|-------------------------|
| zł. 18                 | zł. 9               | zł. 7                | zł. 5                 | zł. 3                   |

La montritaj prezoj estas por ĉiu persono por 1 plentago, enhavas servon, ĉiujn aldonojn, sed sen matenmanĝoj.

La luksa kaj I kategorioj antaŭvidas ĉambrojn 1-2 litajn, kategorioj II kaj III - ĉambrojn 2-3 — litajn, komunaj loĝejoj — plurlitajn ĉambrojn.

### MANĜADO.

Por faciligi al la kongresanoj restadon en Varsovio, ni kontraktis multajn restoraciojn, kie la kongresanoj povos manĝi por kuponaro, antaŭe pagita.

La prezoj estas jenaj:

|             | Kategorio I | Kategorio II | Kategorio III |
|-------------|-------------|--------------|---------------|
| Matenmanĝo  | zł. 2.50    | zł. 1.50     | zł. 1.10      |
| Tagmanĝo    | zł. 5.—     | zł. 2.50     | zł. 1.50      |
| Vespermanĝo | zł. 5.—     | zł. 2.50     | zł. 1.50      |

La supraj prezoj enhavas la trinkmonon.

Loka Kongresa Komitato preparas por kongresanoj multajn faciligojn kaj rabatojn: en tramoj, teatroj, kinoj, sportaranĝoj, kafejoj, sukeraĵejoj, restoracioj, amuzlokoj kaj muzeoj.

### EKSKURSOJ.

Post la Kongreso Pola Vojaĝoficejo „Orbis“ kune kun Societo Turisma de Esperantistoj en Polujo — STEP — organizas por la kongresanoj tre interesajn ekskursojn tra Polujo kun restado en kurac - kaj ripozlokoj.

#### **E k s k u r s o I. Varsovio — Kraków — Wieliczka — Zakopane**

|           |       |  |
|-----------|-------|--|
| 14. 8. 37 | 18.15 | Forverturo el Varsovio al Kraków (klaso III, rapidvagonaro)                                    |
| „         | 23.44 | Alveno al Kraków, transporto de la ekskursanoj kun pakajoj al hoteloj, vespermanĝo, tranokto.  |
| 15. 8. 37 | 9.00  | Matenmanĝo.  |
| „         | 10.00 | Vizitado de la urbo per aŭtobuso kun gvidisto.   |
| „         | 14.00 | Tagmanĝo.  |
| „         | 16.00 | Vizitado de la urbo per aŭtobuso kun gvidisto.   |
| „         | 20.00 | Vespermanĝo kaj tranokto.  |
| 16. 8. 37 | 9.00  | Matenmanĝo, poste libera tempo.  |
| „         | 13.00 | Tagmanĝo.  |
| „         | 14.00 | Forveturo al Wieliczka (klaso II) kaj vizitado de la famaj salminejoj, poste reveno al Kraków. |
| „         | 20.00 | Vespermanĝo kaj tranokto.  |
| 17. 8. 37 | 8.00  | Matenmanĝo, poste libera tempo.  |
| „         | 13.00 | Tagmanĝo.  |
| „         | 15.20 | Forveturo al la stacidomo.   |
| „         | 15.50 | Forveturo al Zakopane per ekspresa motorvagono.  |
| „         | 18.27 | Alveno al Zakopane, transporto de la kongresanoj kun pakajoj al hoteloj — pensionoj.           |
| „         | 20.00 | Vespermanĝo kaj tranokto.  |
| 18. 8. 37 | 8.00  | Matenmanĝo, poste libera tempo.  |
| „         | 13.00 | Tagmanĝo.  |
| „         | 15.00 | Ekskurso al la Pinto Kasprowy per kablo-fervojo, poste reveno al Zakopane.                     |
| „         | 20.00 | Vespermanĝo, tranokto.   |
| 19. 8. 37 | 8.00  | Matenmanĝo, poste libera tempo.  |
| „         | 9.00  | Ekskurso per aŭtobuso al la lago Mara Okulo, poste reveno al Zakopane.                         |
| „         | 14.00 | Tagmanĝo, poste libera tempo.  |
| „         | 20.00 | Vespermanĝo — fino de la ekskurso.   |

La prezo de la ekskurso kune kun veturo al Kraków, Wieliczka kaj Zakopane, kun hotelo, manĝado, vizitadoj, gvidado kaj trinkmono dum plenaj 6 tagoj laŭ la supre menciita programo kostas:

|   |           |           |
|---|-----------|-----------|
| en la I kategorio ĉe fervoja rabato de 33 % | . . . . . | zł. 170.— |
| „ „ „ „ 50 %                                | . . . . . | zł. 160.— |
| en la II kategorio „ „ „ „ 33 %             | . . . . . | zł. 140.— |
| „ „ „ „ 50 %                                | . . . . . | zł. 130.— |

Alpago por la II klaso de Varsovio ĝis Kraków ĉe fervojrabato de 33 % . zł. 10.—

Ĉiu plua tago en Zakopane en pensiono kostas: en la I kategorio zł. 15.—  
de 50 % . zł. 8.—  
en la II kategorio zł. 10.—

### Ekskurso II. Varsovio — Toruń — Gdynia — Marbordo

|           |      |       |  |
|-----------|------|-------|--|
| 15. 8. 37 | horo | 15.25 | Forveturo el Varsovio al Toruń (klaso II, rapidvagonaro).      |
| „         | „    | 18.48 | Alveno al Toruń.   |
| „         | „    | 19.00 | Transporto de la ekskursanoj kun pakajoj al hoteloj.           |
| „         | „    | 20.00 | Vespermanĝo, tranokto.   |
| 16. 8. 37 | „    | 8.00  | Matenmanĝo.  |
| „         | „    | 9.00  | Vizitado de la urbo, enibiletoj al muzeoj.                     |
| „         | „    | 13.00 | Tagmanĝo, poste libera tempo.                                  |
| „         | „    | 17.00 | Vespermanĝo.   |
| „         | „    | 18.00 | Transporto de la ekskursanoj kun pakajoj al la stacidomo.      |
| „         | „    | 18.52 | Forveturo al Gdynia (klaso III, rapidvagonaro).                |
| „         | „    | 22.28 | Alveno al Gdynia.  |
| „         | „    | 22.40 | Transporto de la ekskursanoj kun pakajoj al hoteloj, Tranokto. |
| 17. 8. 37 | „    | 9.00  | Matenmanĝo.  |
| „         | „    | 10.00 | Vizitado de la urbo, haveno ktp. kun gvidisto.                 |
| „         | „    | 14.00 | Tagmanĝo, poste libera tempo.                                  |
| „         | „    | 20.00 | Vespermanĝo. Tranokto.   |
| 18. 8. 37 | „    | 9.00  | Matenmanĝo.  |
| „         | „    | 10.00 | Mara ekskurso al la duoninsulo Hel (per vaporsipo).            |
| „         | „    | 16.00 | Tagmanĝo, poste libera tempo.                                  |
| „         | „    | 21.00 | Vespermanĝo. Tranokto.   |
| 19. 8. 37 | „    | 9.00  | Matenmanĝo.  |
| „         | „    | 10.00 | Plua vizitado de la urbo kaj haveno.                           |
| „         | „    | 15.00 | Tagmanĝo, poste libera tempo.                                  |
| „         | „    | 20.00 | Vespermanĝo. Tranokto.   |
| 20. 8. 37 | „    | 9.00  | Matenmanĝo, poste libera tempo.                                |
| „         | „    | 15.00 | Tagmanĝo, poste libera tempo.                                  |
| „         | „    | 20.00 | Vespermanĝo — fino de la ekskurso.                             |

La prezo de la ekskurso kune kun veturo al Toruń kaj Gdynia. kun hotelo, manĝado, vizitadoj, gvidado, trinkmono — dum plenaj 6 tagoj laŭ la supre menciita programo — kostas:

|  |           |           |
|--|-----------|-----------|
| en la I kategorio ĉe fervoja rabato de 33% | . . . . . | zł. 160.— |
| „ „ „ „ 50%                                | . . . . . | zł. 150.— |
| en la II kategorio „ „ „ „ 33%             | . . . . . | zł. 130.— |
| „ „ „ „ 50%                                | . . . . . | zł. 120.— |

Alpago por la II klaso de Varsovio al Gdynia tra Toruń ĉe 33%-a rabato . zł. 9.—  
„ 50%-a rabato . zł. 7.—

Ĉiu plua tago apud Gdynia (ĉe la marbordo) en pensiono kostas:

en la I kategorio zł. 20.—  
en la II kategorio zł. 15.—

### Ekskurso III. Varsovio — Vilno — Troki — Druskieniki

|           |      |      |  |
|-----------|------|------|--|
| 14. 8. 37 | horo | 0.10 | Forveturo el Varsovio al Vilno (klaso III, rapidvagonaro). |
| 15. 8. 37 | „    | 7.45 | Alveno al Vilno.   |
| „         | „    | 8.00 | Transporto de la ekskursanoj kun pakajoj al hoteloj.       |

|           |      |          |  |
|-----------|------|----------|--|
|           | horo | 9.00     | Matenmanĝo.  |
|           | "    | 10-13    | Vizitado de la urbo kaj ĉirkaŭaĵoj per aŭtobuso.       |
|           | "    | 14.00    | Tagmanĝo.  |
|           | "    | 16-19    | Plua vizitado de la urbo kaj ĉirkaŭaĵoj per aŭtobuso.  |
|           | "    | 20.00    | Vespermanĝo, poste libera tempo. Tranokto.             |
| 16. 8. 37 | "    | 9.00     | Matenmanĝo.  |
|           | "    | 10-14.30 | Ekskurso per aŭtobuso al Troki.                        |
|           | "    | 15.00    | Tagmanĝo.  |
|           | "    | 17.00    | Transporto al la stacidomo.                            |
|           | "    | 17.55    | Forveturo al Druskieniki (persona vagonaro).           |
|           | "    | 20.20    | Ŝanĝo de la vagonaro en Porzecz.                       |
|           | "    | 22.10    | Alveno al Druskieniki.                                 |
|           | "    | 22.20    | Transporto de la ekskursanoj kun pakajoj al penslonoj. |
|           | "    | 23.00    | Vespermanĝo. Tranokto.                                 |
| 17. 8. 37 | "    | 9.00     | Matenmanĝo.  |
|           | "    | 10.00    | Vizitado, promeno.                                     |
|           | "    | 14.00    | Tagmanĝo, poste libera tempo.                          |
|           | "    | 20.00    | Vespermanĝo, poste libera tempo. Tranokto.             |
| 18. 8. 37 | "    | 8.00     | Matenmanĝo.  |
|           | "    | 9.00     | Promenado — plago.                                     |
|           | "    | 14.00    | Tagmanĝo, poste libera tempo.                          |
|           | "    | 20.00    | Vespermanĝo, poste libera tempo. Tranokto.             |
| 19. 8. 37 | "    | 8.00     | Matenmanĝo.  |
|           | "    | 9.00     | Ekskursoj en ĉirkaŭaĵojn.                              |
|           | "    | 14.00    | Tagmanĝo, poste libera tempo.                          |
|           | "    | 20.00    | Vespermanĝo. Tranokto.                                 |
| 20. 8. 37 | "    | 8.00     | Matenmanĝo, poste libera tempo.                        |
|           | "    | 14.00    | Tagmanĝo, poste libera tempo.                          |
|           | "    | 20.00    | Vespermanĝo — fino de la ekskurso.                     |

La prezo de la ekskurso kune kun veturo al Vilno, Troki kaj Druskieniki, kun penslono, manĝado, vizitadoj, gvidado, trinkmono dum 6 plenaj tagoj kostas:

|  |           |
|--|-----------|
| en la I kategorio ĉe fervoja rabato de 33% | zł. 140.— |
| " " " " 50%                                | zł. 130.— |
| en la II kategorio " " " " 33%             | zł. 120.— |
| " " " " 50%                                | zł. 110.— |

Alpago por la II klaso de Varsovio al Vilno kaj Druskieniki

|                  |          |
|------------------|----------|
| ĉe rabato de 33% | zł. 11.— |
| " " " " 50%      | zł. 8.—  |

Ĉiu plua tago en Druskieniki en penslono kostas: en la I kategorio zł. 12.—  
en la II kategorio zł. 10.—

WITOLD ZECHENTER.

## Kion la turo de St-Maria preĝejo en Kraków rakontas?

Preskaŭ ĉiu granda urbo havas sian turon, kiu kvazaŭ gardisto staras en la mezurbo, atente ĉiun ŝian gravan momenton; — turon, el kiu miloj da urbanoj kaj fremduloj rigardas la urbon kaj ĉirkaŭaĵon. Simile kiel Vieno, Antverpeno, Parizo, havas

ankaŭ Kraków sian historian turon, kaj okaze de sia dekjara jubileo disaŭdigis Polskie Radio en Kraków belegan muzikrakonton, verkitan de konata redaktoro kaj aŭtoro Witold Zechenter el la supro de l' Maria-turo.

— — — Kiel mirinda vidaĵo! Homoj kiel formikoj malsupre!...

— — — Kiel bele kaj strange aspektas Draphalo. Urbodomo, la preĝejo de

S-ta Adarberto tiel malgrandega... Strato Florjańska, kiel intermontaĵo profunda, fermita per la pordego, poste Barbakano, kaj Banko Pola, impona monu-

mento de Grunwald... kaj plue la fino de la urbo... la lastaj dometoj... verdaj kampoj kaj arboj...

La vetero bela kaj kiel kristalo pura permesas bone observi la tutan Apodkarpatan teron... per neĝo kovritajn mondopintojn kaj en la suno brilantajn Tatrojn... tiel malproksime...

Aliflanke videbliĝas Ojców... tuta krakova ĉirkaŭaĵo... Termonumento de Kościuszko, apud ĝi ĉam pli-grandiganta termonto de Marŝalo Piłsudski kaj de Wanda en Mogiła...

Indas ekskursi ĝis la supro de l' turo al la gardista ĉambreto. Tiun ekskurson per 221 parte ŝtonaj, parte lignaj ŝtupoj rekompencas malavare mirakla, senkompara siaspece vido al la kuŝanta ĉe ĝiaj piedoj urbo kaj al la proksima ĉirkaŭaĵo.

Tamen neforgeseblan momenton oni travivas nokte, kiam el la fenestreto flagranta alte kiel stelo, eksonas trumpetista melodio. — — — La vidaĵo aspektas tiam kiel ruliĝanta filmo... „Super la tegmentoj de Kraków” — — — Tiu maro de domoj, tegmentoj, stratoj kaj stratetoj, malplenaj placoj, verdiĝanta ringego de plantejoj ĉirkaŭ la mezurbo, strangaj koloroj de pramalnova urbo! — — —

Kaj kiom da legendoj envolvas tiun turon kaj urboplacon!...

Per sango kovrita ponardo pendas sur fera ĉeno en Draphalo, per ĝi laŭ legendo frato fraton mortigis, instigite de Kaina enŝo, vidante, ke la frato pli alten al nuboj levos la murojn de la konstruata turo, kaj tial, unu el la turoj por ĉiam restis nefinita. — — —

La legendoj pri hejnalo (melodio), laŭ kiuj trumpetisto, kiam li per la hejnalo donis signon al la urbo pri invado de Tataroj, estis mortigita de tatara sago, kaj tial, laŭdire, tiu melodio estis subite interrompita...

El tiu fenestreto rigardis la homoj dum multaj jarcentoj... Se eble estus ekvidi tiun pasintecon potencan kaj fieran, pasintecon blank-ruĝan de malnova Krakovo, ĝian mezepokan renesancon, tiujn reĝajn tempojn, la tutan historion grandiozan de la pramalnova ĉefurbo de Pollando! — — — Malgraŭvole vekigis rememoroj el tiu pasinteco, kiel paĝoj elŝiritaj el libro jam velkinta, sed ĉiam vivanta dank al ĝia enhavo. — — —

Sankta-Maria-preĝejo. ekzistanta jam

en XIII-a jarcento, kion ĝi jam vidis, kion ĝi travivis?....

Kion oni povas legi en la historio!... ĉio, kio vivas en la memoro, en ĉiu anguleto de la cerbo, ekestas subite ĉi tie sur la pinto de la Maria-turo, alparolas per viva vorto — — — Kio fariĝis?!... rigardu, homoj kuras... apud la pordegoj de la urbo, sur la herbejoj antaŭurbaj homamasoj! — — — amasoj de sovaĝaj invadintoj — — — Tataroj — — — rigardu! tiu nigra rajdanto celas rekte en la turon — — — flugas la sago — — — kaj la hejnalo subite interrompiĝas — — — fajrobriloj! — — — la sagoj siblas! — — — aŭdiĝas batalbruego. — — —

Sed nova bildo... denove krakova urboplaĉo, malnovaj domoj, grandiozaj riĉe ornamitaj homamasoj soviĝas en la direkto al reĝa kastelo — — — alveturas kolesegoj, venas rajdantoj, diversspecaj vestaĵoj, diversaj lingvoj aŭdiĝas — — — Kraków akceptas eksterlandajn gastojn, nobelojn el tri ŝtatoj, kaj ĉiuj celas la saman vojon — — — fabelan feston, kiun eternigos historio. Tie ĉe la pordo de sia domo, en ora vestaĵo, en ermena pelto, salutas la eminentajn gastojn urbano Wierzynek!

Batas sonoriloj — — — ĉiuj sonoriloj el krakovaj preĝejturoj! — — — Sed alia montriĝas bildo — — — krepusko — — — kion signifas la festo inter malnovaj muroj de ĉefplaco? La popolo festenas.. flagras torĉoj... aŭdiĝas kantoj — — — ĝojkrioj. — — — vivu reĝino! nia sinjorino!

Sed la reĝino en la kvinangula ĉambrego de kastelo per miloj da torĉoj iluminita rigardis Krakovon, dolorplena malgaja — — — Jadwiga! — — — Al ŝi homagias la homamasoj...

Denove tago, sed kiel alia!... Batas sonoriloj... al la urbo fluas impona marŝo kiel serpento brilanta... plenaj stratoj... aŭdiĝas sonoj de trumpetoj kaj kaldronoj. Antaŭen la trumpetistoj en blankaj vestaĵoj sur ĉevaloj per oro kovritaj... centoj da armilportistoj kaj paĝoj diverskoloraj... nobelaro sur belegaj ĉevaloj... Kaleŝo ora soviĝas inter miloj da Krakovanoj tra ĉefplaco, ornamita de floroj, Vavelon, kie atendas Sigismundo la Maljuna... Bona, principino de Bari kaj Milano veturas al katedralo, kie okazos ŝia edziĝfestoj. La komenco de pola renesanco!... Sed la bildo



sanĝiĝas... La homomasoj restas ĉiam pli densaj, kaj sur podio — — reĝo!! —

Reviviĝis bildo de Matejko el muzeo en Draphaljoj... Varma tago en aprilo... la gloro de Polujo kiel suno brilas, fi-ro, ĝojo sur ĉiuj vizaĝoj — — — nun unu homo malgaja kun ironia rideto, Stańczyk, reĝa klaŭno!... sunradioj spe-guliĝas en la arĝenta kiraso de l' princo Albrecht Hohenzollern. Li ekĝenuas antaŭ la reĝo... silento... Prusa ho-m a g i o !!

Denove sonoriloj batas... denove ĝoj-krioj... Al la reĝa kastelo veturas maje-sta komendanto, poste nobelaj rotoj per polvo de longa vojo kovritaj... ar-baro de standardoj, sed ne polaj... va-laĥaj standardoj, centoj da malliberu-loj kaj 50 kanonoj antaŭas la hetma-non (armeestron). Denove granda dan-ĝero forigita... Sur vojo triumfa krako-va urbanaro salutas la venkinton Jan Tarnowski.

Sed la sunon denove kovras nuboj... Alia aperas bildo sur la ĉefplaco. Plenaj gastejoj... la nobelaro interkonsiliĝas, kiel formi la kulpigojn kontraŭ la reĝo. Super la ĉefplaco, super la urbo, super Polujo aŭdiĝas bruo de komenciĝanta ribelo... la komenco de venonta pereco. Ĉiam pli minacaj aspektas la nuboj... Ĉu batas tondroj? Furiozas uragano?.

Pasis jaroj, jardekoj... Venis fune-bra epoko de Kraków, nigraj jaroj de Respubliko. Ne estas tio fulmotondro, ne estas uragano! Ludas svedaj kano-noj, la nuboj de fremda soldataro ple-nigas la stratojn. Enmarŝas la urbon sveda reĝo Karol XII. Komenciĝis san-ga regado de rabisto. Aŭdiĝas vekrioj... Brulruĝo sur nuba ĉielo... Reĝa kastelo brulas... Wawel brulas!... Finiĝis la brila epoko de baroka Wawelo! La stratoj krakovaj travivas interfratajn batalojn... diversspecaj armeoj, svedaj, rusaj, saksaj... kaj subite nova terura bildo... Surteren falantaj homoj... kada-vroj... ne mortigitaj ili estas, sed vik-timoj de pesto.

Vekrioj... preĝoj, funebraj sonoriloj. Kraków tute pereas — — — jam ne-niam la pasintan gloron ĝi atingos...

Sed la koro la koro de Polujo ne ĉe-sas bati. Ĝi batas senĉese, malgraŭ tio, ke venas jaroj de mallibereco, le mal-venkoj. Sed ekbrilas ĉielruĝo de libere-

co... Kraków, kiel unu el centroj de konfederacio, fariĝas lulilo de novaj bataloj por akiri la sendependecon. No-vaj esperoj reviviĝas en la koroj de po-laj civitanoj.

Ludas milita veksignalo... aŭdiĝas gravaj historiaj vortoj: „Mi, Tadeusz Kościuszko, juras antaŭ Dio al la tuta pola Nacio, ke mi nemian maljusta es-tos kaj nenian malutili intencas sed mian ordonpovon nur por defendo de la Patrujo mi uzos, por reakiro de mem-stareco de l' popolo kaj bazigo de ĝe-nerala paco. Tiel helpu al mi Dio kaj senkulpa martiro de Lia Filo!”

Nobla signaldiro de egaleco kaj frate-co ekfloris sur krakova ĉefplaco... ĉie standardoj, floroj, soldatoj en amarant-koloraj kaj bluj uniformoj — — — kaj inter ili generalo Tadeusz Kościusz-ko en vllaĝana vestaĵo, venkinto en multaj bataloj.

Denove multaj jaroj pasis. Kraków ĝojas — — — granda bildo de Napole-on, riĉe iluminita, de generalo Dąbrow-ski, kreinto de polaj legioj, de princo Poniatowski, pola herodo, kiu nur mal-longe havis la feliĉon vidi Aglon Blan-kan...

Sonoriloj denove funebre batas... de-nove brulruĝoj sur ĉielo! Tuta urbo nun brulas... langoj de fajro ĉirkaŭas Kra-kovon, sed ventego dispelas la nubojn de l' fumo, estingas la flamojn... La vento de l' pasantaj jaroj!!... Jen de-nove brilas Draphaljoj, grandioza kon-struaĵo renovigita post longa falo. Sur etaĝoj malfermita la Nacia Muzeo — — malsupre gaja popolfesto, sonoj de bal-moj, fajfiloj... sed la bildo malklariĝas... malaperas... kanonaj pafoj, pafoj de marŝantaj soldatoj — — — bruo de l' aŭtomobiloj kaj veturiloj...

Milito! Milito de l' popoloj, el kies krueleco harbara, sanga, el milionoj da kadavroj, el maro de disversita sango elkreskis Polujo libera jam, kaj poten-ca!

Grandan kaj imponan konstruaĵon Krzysztofory nova envolvis legendo. Po-laj soldatoj, unuaj post 150-jara malli-bereco aperis ĉi tie, fundamento de no-va armeo, revivigita de Komandanto. En Krzysztofory troviĝis ĉefa komandejo de polaj Legioj; el tiu ejo eliris polaj batalionoj al fremdaj frontoj sur pola

tero. por ĝin por si mem akiri! Kaj ili venkis!!

Ekbatis decida horo. Pollando ĉesis esti sklavino kaj mem volas decidi pri sia sorto. Ĝi mem volas konstrui sian estontecon, ĵetante sur pes-teleron de okazoj propran forton armilan.

A l t u t a N a c i o n i p o r t a s f o r p r e n o n d e k a t e n o j...

Tiel diris Marŝalo Piłsudski. Kaj plenigis per enhavo de ago tiujn vortojn. Naskiĝis Polujo el haoso de l' mondmi-lito — — — La tago de l' liberigo! Kraków, kiel unua sur pola tero forĵetis fremdajn signojn.

El urbdoma turo falas dukapa aglo; aŭstria soldataro forkuras... Kraków furiozas... fiera kaj feliĉa. Polaj soldatoj eniras la gardistejon. Eksonas melodio: Dio, kiu Polujon dum multaj jarcentoj gardis kaj glorigis... Sed subite momento da nekutima silento... Kial la sunon, tiel brilan, nigraj kovras nuboj? Lastaj tagoj... El Maria-turo ĝis la tero grandega ondo de l' funebra krepo. La tombaj lanternoj flamas, ĉie nigraj krepoj, ĉie funebraj standardoj — — —

**JULIO MIEROSZEWSKI.**

## LA KAPITANO DE GRANDA BLUFO NOVELO.

Kabineto nro 14, granda domo, Bonstrato, Londono. Kolonelo Wrance, la ĉefo de la „Intelligence-Service” sidas ĉe sia skribotablo, kliniĝinte super la lasta Times-eldono.

— Ion similar oni neniam aŭdis ankoraŭ! — Jen denove tiu Antono Latkov!

Kolonelo Wrance ekbruligis sian pipon. kiu senĉese estingiĝadis. kaj dufoje tralegis la notajeton:

„La novjorka gazetaró, bazante sin sur la informo de „Petit Parisien” sciigas, ke la konata miliardulo Antono Latkov kun speciala aprobo aĉetis en lastaj tagoj konsiderindan paketon da akcioj „Vickers-Establaĵoj”. Tiamaniere en la manoj de tiu industriisto, en Eŭropo samkiel en Ameriko, komencas amasiĝi akcioj de preskaŭ ĉiuj iom gravaj entreprenoj de la armil-industrio...”

La kolonelo laŭte spiregadis; substrekinte la notajon per ruĝa krajono. li ekpremis unu el la butonoj sur la dis-

Per nigra krepo kovritaj agloj,  
Kovritaj ĉiuj legianaj koroj,  
Ĉar sur funebra, nigra veturilo  
Lastan vojon iras al la eterneco  
Nacia fiero, nacia animo —

Heroo sen timo...

La oferema kaj nobla gvidanto  
De l' pola armeo kaj vera soldato,  
Glorplena venkinto,  
Marŝal' de l' Polujo  
Nia Komandanto!

Kraków fariĝas nova pilgrimejo,  
Ĉar el ĉiuj landoj, el ĉiuj mondpartoj  
Alvenas multaj polaj civitanoj.  
Alportante teron, pruvon de la amo,  
Por ŝuti super la krakova valo  
Kiel eternan sanktan rememoron  
Altan monteton, monteton tombejan  
Por sia Marŝalo!

Kiel filmo sorĉita ruliĝas la historio el la Maria-turo... Aŭdiĝas la voĉo de l' jarcentoj, kiuj pasis. kiuj tuŝis la oran kronon de la turo kaj forflugis en la abismon de nereveneco, sed tamen ne preterpasis sen signo.

El la pola lingvo esperantigis

**N. Bertig-Dattnerowa.**

partiga tabulo, kiu okupis rimarkindan parton de lia skribotablo.

Post momento senfrape eniris la kabineton svelta sinjoro, kies ago estis samgrade maldifinebla kiel la koloro de okuloj, kiujn vualis verdetaĵaj vitroj. La alveninto riverencis silente.

— „Kion vi scias pri Antono Latkov?” — demandis la kolonelo, kies voĉo malkaŝadis senpaciencon — tio apartenas ja al via sekcio, sinjoro majoro Right!

— Sinjoro kolonelo, vin interesas verŝajne la notajo en la „Times”. Pri tiu negocado la „Establaĵoj Vickers” scias nenion. Tio estas ankoraŭ unu pli el la nerespondecaj procedoj de la Usona gazetaró!

— Estas evidente, ke sen nia scio li ne povis aĉetaki la akciojn de Vickers. Pri tio min certigi mi ne bezonas. Tamen mia demando koncernas la personon de tiu sinjoro: kiu li estas, kie li loĝas kaj kiujn informojn pri li entenas la kartoteko de „Intelligence Service”.



Majoro Right deformis sian buŝon per imitaĵo de afabla rideto.

— Tiun demandon, sinjoro kolonelo, vi starigas al mi ne la unuan fojon. — Bedaŭrinde niaj plej lertaj agentoj ĝis nun ne sukcesis ekscii ion pli detalan pri Latkov — sendube li estas elstara individuo kaj la ekzakta kaŝado de ĉiuj postsignoj atestas pri ties neordinara faksperto.

— Dankon — ekgrincis kolonelo Wrance — ekpremante alian butonon. En la enirpordo majoro Right preterlasis malaltan blondulon, kiu lin ekrigardis esplore — sinjoro Krockery? — demandis la kolonelo ne levante la okulojn de sur la paperoj.

— Jes.

— Sinjoro Krockery, morgaŭ vi prezentos al la ĉefo de la oka sekcio la sekvontan raporton, bonvolu preni folieton da papero kaj ĉifri: Latkov estas Ruso — postsignoj indikas, ke li kunlaboras kun Trocki — li restadas nun en Detroit; kuniĝadas kun la grupo de Stolnikov en Parizo.”

— Ĉu vi finskribis?

— Jes.

— Sekve, kiel dirite, tiun ĉi raporton, subskribitan de vi mem, vi morgaŭ prezentos.

— Mi? Sinjoro Kolonelo...

— Mi dankas, sinjoro — interrompis malvarme Wrance.

Malalta blondulo, nomata Krockery, salutkuniĝis silente kaj senprokraste forlasis la kabineton nro 14.

Kolonelo Wrance profunde ekmeditis. Finfine alia elirvojo ne ekzistis. Li neniel povis allasi, ke Latkov, pri kiu la tutmonda gazetaro skribadis detale kaj abunde, estu por „Intelligence Service” kvazaŭ mita figuro. De nun Latkov estas registrita en la sekreta kartoteko de la potenca I. S.

\* \* \*

Redakcio de Times, kabineto de l' ĉefredaktoro de la politika sekcio, ĉe telefonredaktoro Smiles.

— Halo! Ĉu redaktoro Smiles, Times? — Ĉi tie ministerio por eksterlandaj aferoj, dua departemento, ĉefo Hockley. Mi estas komisiita ekscii, de kie devenas la notaĵo publikigita de vi pri la afero Latkov kaj „Vickers Establaĵoj”?

— Sinjoro ministro, tiun notaĵon, ni ricevis perkable de nia novjorka kores-

pondanto. Ni publikigis ĝin kun demando-signo.

— Malgraŭ tio ĉiuj stratjurnaloj jam hodiaŭ represis ĝin ĉefaloke. Ni plurfoje interpelaciis la Usonan ambasadon — sed pri sinjoro Latkov ankaŭ pri ties informo estis negativa. Pli proksimajn klarigojn pri tiu afero mi danke akceptus, se vi ilin ekpostulus de via novjorka korespondanto.

— Memkompreneble, sinjoro ministro, senprokraste ni hodiaŭ ekspedos la depeŝon...

Flankenmetinte la aŭdilon redaktoro Smiles ekmalbenis flegme. — La unua kompromitaĵo post 150 jaroj! La Times komencas presigi sensencaĵojn — kaj tion ĉion ni dankas al tiu Jankeso, kiun ni dungis kiel korespondanton.

Smiles eksonorigis. Post momento eniris la stenotipistino.

— Bonvolu noti la depeŝon, kiun ni nepre devas tuj kabli al Novjork. Duobla porekspresa tarifo. Bonvolu skribi:

„Jack Twotress — New York. Ĉiujn sed nur kontrolitajn detalojn pri Latkov. Se estos „anaso” mi elpelos vin sen ia rekompenco. Subskribo: Smiles, Times, London.

\* \* \*

La vangoj de sinjoro Holmes, posedanto de la plej granda presagentejo en New-York, fariĝis ĉiam pli brikkoloraj. Jam delonge Holmes paŝadis en sia kabineto enpense, baraktante obstine; la rezulto de tiu batalo devis ja decidi pri lia sorto. Sur la skribotablo etaĝe suprenleviĝis amaso da depeŝoj. Preskaŭ ĉiuhore el la tutmondo alvenadis pli ol cento da ili, petante pri informoj koncerne Antonon Latkov, kies nomo jam tri monatojn ne forlasis la preskolonojn de la mondgazetaro. — Latkov superis Zaharovon — Latkov elacĉetis la Vickers akciojn — acĉetakis la aviadil-uzinojn en Usono — posedas patenton por produkti la „mortradiojn” — Latkov intertraktas kun Trocki — Latkov pretigas mondrevolucion ktp.

Sed intertempe neniu scias, kio estas Latkov, neniu sias, kie li loĝas, neniu vidis lian foton.

Jen kuŝas depeŝoj de Times, Temps, Petit Parisien, Frankfurter Zeitung, New York Herald, Chicago Tribune, kaj multoj da aliaj gazetoj kaj jurnaloj de la tuta globo. Ĉiuj postulas detalojn, ĉiuj pagos por verso 5 dolarojn. Sed kion fari — la kartotekoj de la plej granda esploroficejo en Usono, la mondfama a-

gentejo Holmes — silentas, ili ne konas Latkov'on.

Direktoro Holmes trinkadis gasakvon kaj fumadis sennombrajn cigarojn. Li kalkuladis enpense. Mallonga teksto — ĉirkaŭ 100 versoj pri tiu malbenita Latkov povus enspezi — sen troigo — ĉirkaŭ duonmilionon da dolaroj. Kiu scias? Eble Havas Reuter aŭ United Press post unu horo per kelkaj sensencaĵoj rompos tiun misteran sorĉon surprizante ceterajn agentejojn?

Iumomente Holmes decide sidiĝis ĉe la skribmaŝino kaj fulmorapide skribis pri Latkov 100 versojn, bonstilan, kiel ĉiuj bultenoj de la agentejo Holmes. La centversa komunikajo, komenciĝanta kiel kutime per la vortoj: „la agentejo Holmes anoncas el New-York” — dum kelkaj horoj ĉirkaŭkuris la terglobon. Jam la matenaj ĵurnaloj en Sidney publikigis ĝin kun sukriĉa komentario.

En la gazetaro de la baltaj landoj ĝi aperis kun 12 horo malfruigo, plidikiĝinte dumvoje ĝis 500 versoj.

\* \* \*

Tri semajnojn post la peiskribitaj okazintaĵoj la Sovjet-unio komencis en Moskvo novan monstran proceson kontraŭ Wade kaj iliaj kunuloj. Karolon Wade akuzis la ĝenerala prokuroro pri kunlaboro kun certa Latkov, amiko de Trocki. Estis pruvite, ke Wade restadis kun Latkov en preciza kontakto, oni prezentis ĉekdetranĉojn kaj abundan korespondadon, el kiu sekvis, ke Wade jam depost jaroj konis Latkovon kaj daŭre kun li kunigadis.

Revelacioj ne mankis. La juĝa esploro malkaŝis la subtilajn fadenojn de l' intrigo. Latkov projektis atencon kontraŭ Stalin pere de la mortradioj, kiujn li mem inventis. Wade konfesis tion. Konfesis, ke li obeis al ĉiuj ordonoj de Latkov — konfesis, ke ili ambaŭ ĉiujare kelkfoje intervidiĝadis — perfidis la cifron, helpe de kiu li ekspedis depeŝojn al Latkov.

Karolo Wade la „perfidulo de la revolucio”, la amiko de Latkov, la dekstra mano de Trocki estis mortkondamnita.

\* \* \*

Ĉu vi scias, kies propraĵo estas la vilao, en kiu ekloĝis sinjorino Simpson? Ĉu vi scias, kies ĉevalo en la Derbyvetkuro gajnis la unuan premion (kapturna sumo de duon-miliono da funtoj)? Ĉu vi scias, kiu edzinigis la plej riĉan

Usonaninon, Miss Alice Lood, filinon de la ĝenerala direktoro de „General-Motors”? Ĉu vi scias, kiu aĉetakis la plej grandan film-kompanion de la mondo: United Artists?

Sinjoro Jack Brown — ordinara Brown, ĝis antaŭ nelonge nesignifa raportisto de iu Londona stratĵurnalo. Sinjoro Brown skribis la unua revelacian libron pri Latkov, la unua kolektis materialojn pri tiu „mistera Eŭropano” kaj eldonis lian biografion. La libro aperis en 34 lingvoj kaj koncerne la cifron de ties eldonoj oni povus citi kompare eble nur la biblion. Tri semajnojn post la apero de tiu revelacio Jack Brown vendis la rajton filmi sian verkon al certa Usona kompanio por du milionoj da dolaroj. Post tri monatoj li edzinigis la ĉarman Alice Lood kaj fariĝis bofilo de unu el la plej monhavaj riĉuloj en Usono. — Jen kiamaniere Latkov kaŭzis por sinjoro Brown famon, riĉan edziĝon kaj fabelan sukceson, sed por la malfeliĉa Wade malhonoran morton.

\* \* \*

Tamen intertempe la reĝisoro de tiu mondspektaklo kaj kunaŭtoro de tiu giganta komedio Raymond Decroix, alnomata de siaj amikoj „kapitano de granda bluf”, ricevadis plue la mizerajn 2000 fr. monate en la redakcio de la etĵurnalo: „La politika vivo” en Parizo. Lin mem kaj liajn du amikojn la „afero Latkov” neniel riĉigis — por ili la sola gajno konsistis en unuaranga mirinda distro, kiun ili ĝuadis plenkore.

Antaŭ du jaroj tri ĵurnalistoj renkontiĝis en S. Moritz sekvante la postsignojn de l' princo Windsor, pri kies persono kaj vivo cirkulis intereseĝaj onidiroj. Tiuj tri senriproĉaj elegantuloj estis: Georgo Karliński el Varsovio, Raymond Decroix el Parizo kaj Jack Twotress el Novjorko.

La princo Windsor kondukis simple sencacie. Matene li skikuradis kaj vespere trinkadis en fermita rondeto de ambatuseksaj amikoj. La tri ĵurnalistoj enuadis nekredeble. Iuvespere Raymond post obstina trinkado ekatakis gale koliko kaj devigis pasigi la nokton en propra lito. La saman tagon vespere kunvenis en lia ĉambro la Amerikano kaj la Polo. La agordo ofte disbloviĝis precipe, ĉar Raymond regalis la amikojn nur per teo kaj keksoj.

— La situacio estas senespera ekopiniis Karliński.

— Jes — ekoscedis rezigne Twotress.

— Ĉar ni morgaŭ disveturos — daŭrigis post momento Raymond, ordigante sur sia hepato elektran kusenon — mi deziras proponi al vi certan petolaĵon. Ni kreu por propra uzo homon kaj okupu nin pri ties politika kariero. Por eviti miskomprenojn mi aldonas, ke temas pri homo papera.

Twotress samkiel Karliński komence ne montradis multe da intereso por la projekto de l' kapitano de granda blufio. Tamen Raymond ne senfervoriĝis pro tiu indiferenteco de siaj amikoj kaj daŭrigis la paroladon:

— Legante el la mondgazetaro mirindajn legendojn pri Zaharov mi ofte ne povis forskui la suspekton, ke li simple ne ekzistas. Mi supozadis, ke la tipo de tiu „Eŭropa misterulo“ estas kreita de kelkaj inventemaj journalistoj. Nur la autentika morto de Zaharov konvinkis min, ke samaŭtentika estis lia vivo. Mi konkludis logike, ke mortinte, li nepre estis devinta vivi.

— Mi mortis, sekve mi vivis — ies, tio tekstas sufiĉe logike — rimarkis Twotress.

— Do, aŭskultu: tio, kio ne estis vera rilate al Zaharov, povas esti vera koncerne Antonion Latkov.

— Kiu li estas?

— Kiu? Latkov? — Antonio Latkov ne ekzistas, sed malgraŭ tio estos la plej fama persono sur ambaŭ duongloboj. Postmorgaŭ en „La politika vivo“ ekaperos la jena notaĵo. Kiel informas Usona Gazetaro, Antonio Latkov aĉetis de la fama Ford la gigantajn industri-

establaĵojn en Detroit. Kiel konate, apartenas al tiu multimilionulo multenombraj ŝtalfarejoj en Usono kaj konsiderindaj ferminejoj. Ankaŭ kelkaj semajnoj Latkov akiris ujon da akcioj de granda amunici-fabriko en Svislando. — La Usona gazetaro asertas, ke Latkov estas dua Zaharov kaj pri ties intrigoj en internacia perarmila politiko ne mankas revelacioj ktp.

— Leginte la notajeton en mia ĵurnalo vi, Karliński, en pola gazetaro brue ekaŭdigos sukriĉan, kvar kolonojn longan artikolon citante „La Politikan Vivon“ kaj la Usonian gazetaron. Memkompreneble vi ne ŝparos multenombrajn komentariojn kaj misterajn aludojn.

— Nu, kaj semajnon poste — ekkritis Twotress — en „New York Herald“ mi publikigos artikolon sub titolo: Latkov la mond-ekbruliginto, ni demaskas la duan Zaharov!

— Malrapide, sinjoroj. — interrompis Raymond — jam en la tria artikolo estos nepre necese indiki la misterajn rilatojn, kiuj ligas Latkov-on kun Trocki. Tio estas garantiata artifiko.

— Brila ideo — rideksplodis Twotress — tio estos la unua „anaso“, kiu kelkoble transnaĝos ĉiujn oceanojn tien kaj reen; vivu Latkov!

Jen kiel Antonio Latkov, kiu dum kelkaj jaroj maltrankviligis Eŭropon — eksaltis el la kapo de l' granda kapitano de blufio Raymond Decroix en hotela ĉambreto en S. Moritz! Kiu konas pli bone la potencon de l' blufio ol ni, ĵurnalistoj...?

Esperantigis Dro K. Mieroszewski

### *Al mia knabo.*

Vi neniam estis kun aliaj,  
Vi neniam partoprenis ludojn,  
Dum vesperaj horoj en mansardo  
Izolita, ludis vi preludojn.

Kiam luno arĝentumis nokton,  
Vi kaŝiris al laŭbeto parka  
Kaj al strigoj rondokulaj flustris  
Poezion dolĉan de Petrarka.

Vi ne estis ido de l' nuntempo,  
Vin ne naskis tango kaj fokstroto,  
Mezepoka eta kavaliro,  
En la revoj — brava Don-Kihoto.

Eĉ ĝis nun vi restis revemulo.  
„Filozofo“ — nomas vin najbaroj.  
Vivosencon legas vi en steloj  
Kaj feliĉon serĉas trans la maroj.

## B I B L I O G R A F I O

**MARIA KAJ LA GRUPO.** Originala romano de Emba. Eldonis Literatura Mondo, Búdapest. Formato 20×13.5 cm. 176 paĝoj. Kolora kovrilo. Prezo broŝurita 0.70 dolaroj, bindita 0.95 dolaroj, sur luksa papero kaj en luksa bindo 1.30 dolaroj, plus 10% por sendkostoj.

„Noli me tangere!” — ne tuŝu min! Per tiuj ĉi vortoj oni devas averti novajn adeptojn de nia movado, al kiuj la grupaj bibliotekistoj nepre malkonsilu la legadon de la recenzata romano. Stelrompo, delogo de knabino, falsado de kambioj, defraŭdo, profiteco, personaj ambicioj kaj ambicetoj — jen la enhavo de la libro. Se la aŭtoro estus ankoraŭ priskribinta en sia verko murdon kaj abortigon, la leganto konatiĝus kun la ĉefaj partoj de la punkodo, prezentita en facile digestebla, ĉar beletra formo.

Vi certe supozas, ke „Maria kaj la Grupo” estas ia kriminala romano, en kiu la agado okazas en medio de krimuloj kaj anormalaj kanajloj. Ho, tute ne, en la libro estas respegulita normala vivo re esperantista grupo en iu lando, kiun la aŭtoro ne malkaŝas, sed kiun ĉiu scianta iom la hungaran lingvon facile povas konjekti. La nomoj, kiujn la verkisto donis al siaj herooj, estas hungardevenaj, ĉar en la hungara lingvo signifas: Baka — soldato, Retek — rafano, Ĉuka — ezoko, Ĉutak — tufo, Toboz — pinfrukto, Perc — krakeno.

Sed tute malĝusta kaj por la aŭtoro certe ofenda estus la supozo, ke la rilatoj, kiujn li priskribis en sia libro, estas karakterizaj por la esp. movado en lia lando. La agado en lia romano povas okazi en iu ajn lando de la vasta Esperantujo, ĉar la karakteroj de la rolantoj havas nenion komunan kun ilia nacieco, sed estas — laŭ premiso de la aŭtoro — ekskluzive rezulto de l' aparteno de la agantoj personoj al certa socia klaso. Per tiu konstato ni pensatingas la „kernon” de la romano, kiu estas okulfrape tendenca.

La aŭtoro priskribas la grupan vivon de „burgaj” esperantistoj, al kiu li kontrastigas la rilatojn regantajn en la organizado de esp. laboristoj. Ĉi tiujn lastajn karakterizas la verkinto tiamaniere: „Aliaj homoj kaj alia atmosfero estas tie. Pli da sento pri frateco kaj kompreno... Tie estas seriozaj homoj, kiuj serioze konsideras la movadon”. Tamen

blinde fanatika la aŭtoro ne estas, ĉar li konfesas bonvole, ke en la burĝa grupo troviĝas kelkaj „laboremaj, eĉ ofe-remaj esperantistoj”. Ĉiuj ceteraj „burgoj” estas aŭ kanajloj, aŭ bonkoraj stultuloj aŭ fine sencerbaj ĝejunuloj, kiuj havas nenian komprenon por nia movado, kaj tute ne scias nian lingvon. Kaj sur tiu odoraĉanta burĝa marĉo elkreskis du bclegaj floroj: Maria, la sekretariino de la grupo kaj ŝia kunhelpanto Petro. Ili ambaŭ estas la korfavoratoj de la aŭtoro, ĉar ili apartenas al la laborista klaso, kaj nur tute hazarde aliĝis al burĝa esp. grupo.

Ĉiu honesta, per particeco ne blindigita homo devas simpatii kun la laborista movado, kiu eble en ne tre malproksima estonto bonfare aliformigos la bildon de la hodiaŭa mondo kun ĝia maljusta socia strukturo. Sed la fakto, ke la aŭtoro apartenas al socialdemokratiaj rondoj ne pravigas esperantistojn. Se la aŭtoro volis pruvi sian tezon, ke Petro estas pli bona ol Paŭlo, li nepre ne devis premi, ke Paŭlo estas kanajlo...

S-ro Emba ne intencis ja verki propagandan broŝoron, sed li volis supozeble prezenti al la esperantistaro artvaloran literaturaron. Se la tendenco de la libro ne estus tiel akre markita, la romano havus pli altan valoron el la literatura vidpunkto, kaj pli simpatie impresus la leganton. Sed bedaŭrinde — man sieht die Mache, und man wird verstimmt...

Ĉu la aŭtoro havas talenton? Sendube jes, kaj ni tuj aldonu — talenton konsiderindan. Liaj herooj ne estas surpaperaj figuroj sed vivaj homoj el sango kaj karno, kies trajtojn la verkisto bonege scipovas skizi. Konsiderante, ke la aŭtoro uzas perfektajn lingvon kaj stilon, kaj ke li preferas simplajn, mallongajn sed samtempe precize konstruitajn frazojn, ni kun plezuro konstatas, ke li havas ĉiujn ecojn por okupi en nia literaturo lokon forlasitan de Kabe.

Sur 165 paĝoj de la libro ni trovis nur kelkajn neĝustajlojn kaj malglataĵojn, kiuj certe malaperos en la estontaj eldonoj. Jen ili:

„La kunsido estis kunvokita” sed ne „kunvokite” (p. 20). Anstataŭ „...diversaj afiŝoj kolorigis la ĉambron”, oni uzu „koloris” (p. 8.). La vorto „enui” esprimas agon netransitivan, kaj pro tio malĝusta estas la frazo „neniam... mi

legis tiom enuan libron" (p. 33.). Devas esti „enuigan". Sur la paĝo 15. ni trovas strangan kunmetaĵon „kudrilmaŝino" anstataŭ „kundromaŝino", ĉar ja Maria havis maŝinon por kudrado, sed ne por produktado de kudriloj. La aŭtoro antipatas videble la sonon „h", kaj uzas (kvankam ne tute konsekvence) la sonon „k" en la vorto „kaoso" (p. 12, 13, 17), sed sur la paĝo 137. ni trovas la formon „haoso". Ĉi tiu lasta formo estas fundamenta, sekve la sole ĝusta. La frazoj „Ili ĉiuvespere eksidis..." (p. 33.) kaj „...poste ankaŭ li ekpaŝadis hejmen (p. 42.) atestas, ke la aŭtoro iafoje tute kontraŭsence uzas la prefikson „ek" kaj la sufikson „ad". La mortinton oni adiaŭas ne kun sed per flua parolo (p. 159.). Minja estas virino. Kial do la aŭtoro nomas ŝin „judo"? (p. 164.). Ĉu la sufikso „ino" ne estas aplikebla en ĉi tiu vorto? La vorto „kabarreto" (p. 164) estas malĝusta — ĝeneralligis la uzo de la formo „kabaredo". La posesiva pronomo „ŝia" en la frazo „...ŝi subite devas elpaŝi... en ŝia blanka bluzo" (p. 161.) estas kontraŭgramatika. Devas esti „sia". Ne nur netrafa, sed tute nekomprenebla estas la frazo „...kvazaŭ eĉ ne vidus rimarkante la ĝoje babilantajn samideanojn" (p. 18.).

Fine eta rimarko koncernanta la antaŭparolon verkitan de majstro Baghy. En Esperantola adverba participo **ĉiam** rilatas la subjekton de la **ĉefa proppozicio**. Pro tio kondamninda estas la frazo „Emocio regas min, pensante pri la vojkomenco", ĉar ja „emocio" sed ne „min" estas la subjekto.

**Napoleono.**

### RICEVITAJ GAZETOJ.

Ĉi sube ni prezentas liston de ricevitaj gazetoj, pli ĝuste ĝian fragmenton, kies kompletigo aperos en la plej proksima n-ro de P. E. Ni atentigas, ke la ordigo de la listo estas tute hazarda, ne alfabeto, kaj nenion diras pri niaj preferoj:

**The British Esperantist**, adreso: The British Esperanto Association, Inc. 142 High Holborn, London, W.C. 1.  
**La Vojo**, monata gazeto por infanoj. Eldono de Federacio de Laboristaj Esp-istoj en la regiono de la nederlanda lingvo. Adr.: E. Faulhaber, Marathonweg 15, Amsterdam Z.  
**Le Phare de l' Esperanto**: Villa Zamenhof, Sisteron (B. A.) France.  
**Nia Gazeto**: Nice (Francujo) 29. av. de



Katalogon petu de la admin. de „Pola Esp."

la Victoire.  
**Scienca Gazeto**: Amerika Esperanto-Instituto, Rockford, Illinois, Usono.  
**Esperanto-Lernanto**: Japana Esperanto-Instituto, Japanujo, Tokio, Hongo-Motomaĉi.  
**Esperanto Internacia**: Monata organo de la Internacia Esperanto-Ligo. Redaktoro: Teo Jung, 223, Harstenhoekweg, Scheveningen, Nederlando.  
**Nederlanda Esperantisto**, Redaktoro: Hendriks, Verstolkstraat 7, Leeuwarden.  
**Katolikusok Csillaga** (Katolika Ŝtelo): Budapeŝt V. kerület, Géza-utca 4. szám.  
**Internacia Pedagogia Revuo**. E. J. Boltjes. Engelschelaan 30, Winschoten (Nederlando).  
**Ligilo** — Revuo por Esperanto-movado en ĈSR. Prostejov, Vrchlického 18.  
**Literatura Mondo** (kun aldono: Lingvo libro). Hungarujo, Budapeŝt. IX, Soroksári-str. 38.  
**Heroldo de Esperanto**. Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando.  
**La Suda Stelo**: Slav. Brod, Jugoslavio.  
**La juna Vivo**: West-Graftlijk (N. H.), Nederlando.  
**The American Esperantist**: 1517 H. Street, N. W. Washington, USA.  
**Helena Esperantisto**: 21 Str. Rodou, Ateno (8), Grekujo.  
**Aŭstria Esperantisto**: Wien I, Neue Burg.  
**Franca Esperantisto**: 34. Rue de Chabrol, Paris X-e.  
**USE-EHO**, organo de la eŭropanismo. Timisoara I, Rumanio, Banato.



**La Praktiko:** Riouwstraat 172, Den Haag  
(Nederlando).

**Bulteno de Internacia Scienca Asocio  
Esperantista.** Redaktejo: S-ro Mar-

cel Daniel Dupuis, 58, Rue de la Ro-  
chefoucauld, Paris 9-e. Francujo.

(daŭrigota).

**EUGENIUSZ MATWIEJCZUK (BORKI).**

## Kaj ree...

...Kaj ree krimvolo homkorojn katenas, krimema fisento malpaca,  
kaj ree homaron danĝero alvenas, terura, fantoma, minaca...  
denove je tondroj graveda aero, anoncas tempeston murmure  
kaj novan militan haoson sur tero, al ni ĝi heroldas terure.

Kaj ree plej sankta de l' pac' idealo, pereas, cindriĝas sen savo,  
kaj ree atendas homaron... batalo, murd', ĝemoj, krim' fajro kaj glavo;  
kaj ĝemas homaro per ĝem' de viktimo, ĉar iras tempesto lavanga,  
ĉar ree revenas monstrego fikrimo, satana, damninda kaj sanga.

Denove pereos homara kulturo, pereos homecaj la sentoj,  
denove ekregos bestig' kaj teruro, ekfluos de sango torentoj,  
de gasoj venenaj ekiĝos apliko, falegos potencoj kaj tronoj,  
denove ekiĝos infera muziko de surda krakad' de l' kanonoj.

Ekfajfos la kugloj sangmorton portantaj, ekregos turment', agonio...  
kaj ree amsentoj noblecaj kaj sanktaj endronos en murda rabio.

Ne povas esprimi teruron homvorto, teruron tromonstran, sen nomo...  
kaj ree minacas homaron de l' morto, sangruĝa, ostara fantomo;  
ĝi iras, ĝi venas... kruela, timiga... ĝi Dia kolero kaj punilo,  
en mano ostara ektintas mortiga, sangversa, vivraba falĉilo.

Ho, Dio plej justa, plej sankta, kompata...

Di' granda, Di' bona, plena...

ho savu homaron... Potenc' nekonata,

ĉar sort' ĝin minacas malbena!

Forkuru fantomoj de l' krimo senditaj,

fantomoj de l' mort' kaj pereoj,

forkuru kaj falu je polv' disbatitaj,

ĉe bar' de „Interna Ideo“.

**HENRYK GIELB.**

## SUKCESINTA EKSPERIMENTO KRIMINOLOGIA EN TURKUJO.

Turkujo, sendube estas la sola ŝtato, kie la nuntempa kulturo kaj ĉiuj atingoj de la scienco, estis adaptitaj „per unu paŝo“, dum eksterordinare mallonga tempo. La malliberejo-problemo, tiu medio, kiun oni gardas kontraŭ eksperimentoj en ĉiuj landoj, estis en Turkujo preskaŭ ĝis la lastaj jaroj, medio regata de komprenoj kaj aranĝoj mezepokaj. Radikalaj ŝanĝoj en la malliberejaj aranĝoj de Turkujo, preskaŭ revoluciaj, — estis faritaj dum la lasta jaro. Ilin iniciatis kaj komencis juna ab-

solvento de la universitato en Istambul, Bay Mutahhar Serif Basoglu, kiu ekin-tenresigis pri la mallibereja problemo. Fininte la juran fakultaton, li vojaĝis eksterlande, vizitante la malliberejajn instituciojn en kelkaj landoj, int. al. en Svisujo kaj Belgujo. Reveninte en la hejmlandon, B. M. Serif Basoglu estis nomita kiel estro de la mallibereja fak-ko de la Justeco-ministerio de Turkujo. Tiam li decidis fari radikalajn ŝanĝojn en la malliberejaj aranĝoj de Turkujo, konforme al la modeloj observitaj eks-



terlande, kaj konforme al siaj propraj opinioj je la problemo de reensocietigo de krimuloj. La ĉefa ideo de liaj entreprenitaj aranĝoj estas la opinio, ke ĉiun normalan krimulon, en konvenaj kondiĉoj kaj rirkonstancoj kaj per konvenaj metodoj, oni povas eduki al homo normala, honesta kaj socie utila. Kiel rimedon plej taŭgan por la reensocietigo de krimuloj, li elektis malliberejajn koloniojn, kiuj — kontraŭe al la monotona kaj malĝojigaj malliberejo-muroj, influas je la malliberulo sanige, same fizike kiel spirite.

Kaptinte por siaj ideoj kaj planoj la justeco-ministron, B. M. Serif Basoglu decidis fondi la unuan agrikulturan kolonion por malliberuloj sur la senhoma insulo Imrali.

La okan de novembro 1935, 50 krimuloj kondamnitaj al multjara malliberejo, garditaj de ĝendarmoj kaj sub la protekto de B. M. Serif Basoglu, estis transportitaj al la nomita insulo.

La insulo Imrali, ampleksanta areon de 24. kv. klm. estis enloĝata de neniu kaj ne troviĝis sur ĝi iaj loĝejo-aranĝoj. Alveninte sur la insulon, oni tuj starigis provizoran tendaron kaj parto de la krimuloj tuj komencis konstruon de domo. La alian parton de la krimuloj oni okupigis ĉe preparo de grundo por legomo-ĝardeno.

La laboroj ekmarŝis eksterordinare rapide; la malliberuloj, pelitaj de neniu, preskaŭ vetkuris en sia laboremo. Tia-

maniere, en tre mallonga tempo, estis finkonstruita domo kaj kulturigita granda tereno por ĝardeno. La rezultoj, atingitaj sur la insulo Imrali dum tiom mallonga tempo, estas preskaŭ revelaciaj. La mallibereja kolonio sur la insulo estas pli multe simila al laborokomunumo, kie, en harmonia konsento kaj propravola disciplino, ĉiuj laboras por la komuna bonhavo, ne provokante iajn ajn konfliktojn inter si.

La gardanta ĝendarmaro, kiu — proporcie al tia nombro da malliberuloj — estis reduktita ĝis minimumo, plenumas la rolon de spertaj inspektoroj kaj specialistoj. La ĝendarmoj ne portas armilojn malkaŝe, — nur revolverojn kaŝitajn en la poŝoj, kio ankau bone pruvigas pri la atmosfero, reganta inter la loĝantaro de la insulo.

Rilate la fondinton de la kolonio, B. M. Serif Basoglu, — oni devas substreki, ke ofte li partoprenas en la laboroj de la kolonio, ne montrante al la krimuloj sian superecon, nur simple li laboras kun ili kvazaŭ li apartenus al la loĝantaro de Imrali.

Al lia persona kaj senpera influo, grandparte oni devas danki pro tiom bone sukcesa eksperimento, kiu estas komenco de radikalaj ŝanĝoj en la mallibereja organizacio de Turkujo.

El „W służbie penitencjarnej”  
esperantigis la aŭtoro.

## SKOLTA ANGULO.

### POST UNU JARO.

Unu jaro jam pasis de tempo, en kiu unua pola skoltgazeto „Skaut” en Lwów — ekkomencis denove, kaj jam konstante, aperigi en ĉiu numero „Esperantan angulon”. Bone do estus, fari nun malgrandan konsciencalkulon, kaj de unujara perspektivo rigardi sian laboron. Malgranda babilado kun ciferoj.

De komenco jam, redakcio de Skaut, forjetis esperantajn kursojn kaj lingvajn diskutojn — oferante la tutan por la „angulo” destinitan lokon, je la informado, kaj propagando. Nia ĉefa principo estis: „informi polan skoltaron pri la esperanto-movado en tuta mondo, kaj tutan mondon pri skoltismo en Polujo”.

Interesiĝo de eksterlando per la angulo multe helpis al ni en tiu direkto — kaj permesis al ni pligrandigi la es-

perantan parton de la gazeto.

Post kelka tempo ni havis jam kelkajn konstantajn kunlaborantojn eksterlande, kaj ni komencis traduki polen iliajn korespondaĵojn kaj presi ilin en „Skaut”. Konstante skribis al ni: Sro E. Mesritz el Holando, sro Abdu Ibrahim el Snaki, Egiptujo, sro I. Tisdaal el Australio kaj fame konata hungara nia skoltamiko sro P. Balkanyi.

Entute — dum la pasinta jaro aperis: 5 artikoloj poresperantaj, 22 notoj pri Esperanto, 7 artikoloj en Esperanto, 26 komunikoj pri esperanta movado, 13 artikol-korespondaĵoj de eksterlandaj skoltoj.

Krom tio ĉi sur lasta paĝo de ĉiu numero — estis presitaj en Esperanto titoloj de ĉiuj artikoloj.

La Redakcio — dum tiu ĉi tempo ricevis: 58 leterojn el 14 landoj, inter ili tri el Egiptujo, kaj du el Aŭstralio.

Ni opinias do, ke ni faris bonan kaj utilan poresperantan laboron — kredante, ke ĝi ne restos senfrukta kaj pola skoltismo konvinkiĝos pri la utileco de

### GRAVA POR SKOLTOJ.

Dum la Jubilea Kongreso en Varsovio okazos ankaŭ kunsido de SEL. Ĉar ne multaj skoltoj povos ĝin partopreni, mi petas, ke ĉiuj skoltoj, kiuj persone ne povos tion fari, sendu perletere siajn proponojn, sugestojn, komunikojn — kaj

Esperanto por internaciaj skoltoj rilatoj

Kaj ni kredas — ke en aliaj skoltoj rondoj eksterlande — ni trovos imitantojn.

Redakcio de „Skaut”.

eventuale eĉ referatojn pri skolt-esperantaj temoj je miaj manoj.

Mia adreso estas: Józef Toczyski — Lwów, Polujo — Szpitalna 2. SEL agento por Polujo.

### KOMUNIKO DE UEA.

La Cefdelegito de U.E.A. por Polujo informas nin, ke la Jarlibro de UEA por la jaro 1937 aperis komence de junio n. j. kaj estas dissendata al ĉiuj pagintaj membroj.

La Jarlibro pro la Jubileo de Esperanto enhavas krom la informa materialo ankaŭ interesajn artikolojn, rilatantajn al nia movado 1887—1937 kaj ilustraĵojn.

Cefdelegito de IEL. por Pollando inĝ. Michał Chmieliński, sciigas interesitojn, ke en tempo 5. — 14. VIII. lia provizore ŝanĝita adreso estas: Warszawa, Wspólna 65, m. 17, sed petas prokrasti mendojn ĝis la 1-a de septembro pro lia foresto en konstanta loĝloko.

S-o B. R., Włocławek. La himno pri la sunsubiro de Słowacki estas jam belege tradukita. Vian tradukon ni ne povas enpresigi, ĉar ĝi montras multajn lingvajn mankojn. Ni konsilas multe legi por bone ekkoni la lingvon.

S-o Ted. A., Damschen, 8550 Densmore Ave. Seattle, Washington, U. S. A. deziras korespondi per leteroj aŭ poŝtkartoj.

S-o Franciszek Brachmański, komercisto, Radlin Śl. ul. Rybnicka 37, Pollando, kore invitas samideanojn, kiuj veturos al la kongreso en Warszawa, ke ili vizitu lin.

Al gesinjoroj Hela Masiewiczka kaj Salomon Śl., Pola Esperantisto sendas gratulojn pro la geedziĝo.

### UWAGA! WAŻNE!

Polscy esperantysty opłacają za udział w Kongresie zł. 25.—. Młodzież szkolna zł. 14.50. Dalsze zniżki nie są przewidziane! Komitet Organizacyjny Kongresu (Al. Jerozolimskie 39/11) wzywa polskich esperantystów do wzięcia masowego udziału w Jubileuszowym Kongresie.

### UWAGA!

Wszelkie wpłaty abonamentu miesięcznika „Pola Esperantisto” skutecznie można na konto PKO Nr. 406.660 lub przekazem rozrachunkowym, kartoteka Nr. 29. co zaoszczędzi wpłacającym koszty przesyłki.

PRENUMERATA: rocznie zł. 8.—, półrocznie zł. 4.— Dla Towarzystw i grup esper. rocznie zł. 6.— Zagranicą: fr. sw. Numer pojedynczy zł. 0.70. podwójny zł. 1.40.

OGŁOSZENIA: 1/2 strony zł. 30.— 1/4 strony zł. 15.— 1/8 strony zł. 10.— Korespondencja: małe ogłosz. z 10 słów (prócz adresu) zł. 1.—

PRZEKAZ ROZRACHUNKOWY, KARTOTEKA NR. 29. —

ABONO: jare zł. 8.—, duonjare zł. 4.— Por societoj kaj grupoj esperantistaj jare zł. 6.— Eksterlande 7 sv. fr. Aparta numero zł. 0.70 duobla zł. 1.40.

ANONCOJ: 1/2 paĝo zł. 30.— 1/4 paĝo zł. 15.— 1/8 paĝo zł. 10.— Korespondado: anoncento de 10 vortoj (krom adreso) zł. 1.—

KONTO P. K. O. NR. 406.660.

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: KRAKÓW, LUBICZ 24.

